



ISRAELI ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

Tel Avivo 61390
Poŝtkesto 39004

N-ro 60. Aprilo 1977

האספרנטו סיס הישראלי

בסאון הליגה לאספרנטו בישראל

תל - אביב - 61390, ת.ד. 39004

חברת 60 - אפריל 1977

הערך:אלכסנדר בנור

ISRAELIA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO
EN ISRAELO

Tel Avivo 61390,
Poŝtkesto 39004

N-ro 60. Aprilo 1977.

Ĉefredaktoro:

Aleksander Manor

en la redakta komitato:

Josef Šemer

FAMAJ JUDAJ VERKISTOJ

ŜALOM ALEJĤEM

La jaro 1977 estas proklamita en Israelo, kiel "Jaro dediĉita al la verkisto Ŝalom AlejĤem", okaze de sesdeka ĉatreveno de lia morto.

La verkoj de Ŝalom AlejĤem estas tradukitaj en kvardek lingvojn, inter ili en ĉinan kaj japanan. Liaj verkoj "Violonisto sur la tegmento" kaj "Tuvia la laktisto" konkeris la tutan mondon.

La fama rusa verkisto Konstantin Fadiejev starigis Ŝalom AlejĤem sur sama nivelo de mondfamaj verkistoj: Dickens, Mark Twain kaj Ĉeĥov.

En la jaro 1910, post la traduko de la verkoj de Ŝ.A. en la rusan lingvon, skribis la fama rusa verkisto Maksim Gorki al Ŝ. A.: "La libron Motl la filo de la sinagogkantoro Pejŝi mi legis ridante kaj plorante, plorante kaj ridante. Mi premas vian manon".

La verkoj de Ŝ. A. havas do ne nur nacian valoron por la juda nacio, sed ankaŭ internacian kaj estas legataj en la tuta kultura mondo.

A. Manor

FAMAĴ JUDAĴ ESPERANTISTOJ

D-ro A. I. Asnes

Redaktoro de "Ruslanda Esperantisto"



A. I. Asnes, juda kuracisto. Lie-istiĝis en 1904. En la Enciklopedio de Esperanto, 1933-1935, estas nek lia biografio nek lia foto. En la libro "J. Dietterle, Originala Verkaro de L. Zamenhof" sur la p. 517, 548-556 estas leteroj de L. Zamenhof al A. I. Asnes. Asnes redaktis en S. Peterburgo "Ruslandan Esperantiston" de 1905. I. Ostrovskij en S. Peterburgo eldonadis en 1905 gazeton "Esperanto", vivinte en Jalta, Krimeo. En la letero de 8.6.1905 Zamenhof parolas pri malgranda letereto, presota en la gazeto "Ruslanda Esperantisto"; en la letero de 12.1.1906 Zamenhof parolas pri artikoleto, presota en "R. E-isto"; en letero de 25.1.1906 li parolas pri kritiko de Hilelismo fare de A. Dombrovski.

Ni publikigas nun la unuan fojon leteron de d-ro A. I. Asnes al la prezidanto de la Lingva Komitato, prof. E. Boirac.

"Espero", S. Peterburgo, la 18/XII 1906

Societo Esperantista
EN S. PETERBURGO,
konfirmita

de S-ro la Ministro
por Aferoj Internaj
la 24-a de Marto 1892.

Al Sinjoro Prezidanto de la Lingva Komitato
Profesoro E. Boirac.

Tre estimata Sinjoro!

Je Via lasta letero, en kiu Vi antaŭadmonas min, ke se mi "ne respondos al tiu letero, mi prenos sur min fortrestri Vian nomon el la nomaro de niaj kolegoj", mi rapidas doni al Vi kelkajn klarigojn pri mia kvazaŭ neakurateco kaj mi esprimas la esperon, ke Vi ne rifuzos raporti ilin al tre estimataj komitatanoj.

En la Bulona Kongreso laŭ korespondo de l'gazeto "Lingvo Internacia" mi estis elektita membro de la Lingva Komitato, pri kio tamen mi ne estis oficiale nek sciigita, nek demandita, ĉu mi estas libera aŭ ne kaj sekve ĉu estos al mi possible partopreni en tiu grava laboro? Kompreneble, la unua argumento ne estas grava, ĉar ĉiu esperantisto devas laŭ sia ebleco helpi per kia ajn laboro disvastigadi nian karan ideon, sed la dua - estas tiel grava, ke mi estas devigita doni plej detalan raporton. Kiel, eble, al Vi estas konata, ke antaŭ du jaroj ĉe ni en Rusujo la vasta kaj organizita propagando de Esperanto preskaŭ ne ekzistis, nur izolitaj esperantistoj laboradis kaj laboradis senlace, detruante iom post iom renkontitajn al ili barojn. En la ko-

menco de 1904 jaro mi, loĝanta en centro de spirita vivo de Rusujo, en Peterburgo, iel eksciis pri Esperanto kaj pri ĝia celo. Ekflamiĝinte per noblaj ideoj de nia meĝstro D-ro Zamenhof, mi fariĝis adepto de Esperantismo kaj post unu monato sekretario de S-to "Espero". De tiu ĉi momento mi ne scias, kion devas signifi la vortoj "libera tempo": La tutan tagon la vizitado de malsanuloj, la tutajn vesperojn laborado por S-to "Espero". Sed kio estas laborado ĉe ni en Rusujo. Vi, liberaj regnantoj, ne povas imagi al vi. Vi senlace propagandas kaj konvinkadas Viajn aŭskultantojn, sed ni, mizeraj ruslandaj sklavoĵ, oficiale nomitaj regatoj, devas bataladi kaj bataladi ĝis morto kun nia malestiminda registaro, kies devizo estas nur sufokadi kaj mortigadi eĉ la ĉian viveman nson. Kompreneble, el tiuj kelkaj vortoj mia rilato al nia registaro estas al Vi tute klara! Kiel patrujano mi ne povis foriri flanken de politika vivo kaj ĝia agado, mi partoprenas kaj partoprenos ĝis ĝi, nia registaro, tiu ĉi putriĝinta absceso ne kreviĝos kaj per ĝia morto fine ne liberiĝos la malsatan, malriĉan popolon! Nur tiam, kiam eklumiĝos ĉe ni la libereco, kiam ni nin sentos liberaj, tiam mi povos partopreni en Via tre estimata Komitato. Mi finis kaj nun de Vi dependas elstreki min el Via nomaro, sed mi humile petas Vin, en ĉiu okazo ne rifuzi sendi al nia redakcio Viajn cirkulerojn.

Via humila servanto d-ro Asnes

Transskribis Adolf Holzhaus

KOMPLETIGO de "VERKOJ DE L. ZAMENHOF"

La listo de la verkoj de L. Zamenhof aperis en I. E. n-ro 99, p. 3. Jen aldonaj verkoj:
376 leteroj de L. Zamenhof, publikigitaj de J. Ditterle en 1929 en la libro "Originala verkaro de L. Zamenhof", 416-585 p.
276 leteroj de L. Zamenhof publikigitaj de G. Waringhien en 1948 en du libroj "Leteroj de L. Zamenhof", 726 p.
360 leteroj de L. Zamenhof, publikigitaj de A. Holzhaus en 1975 en la libro "Zamenhof-leteroj", 329 p.
20 originalaj poemoj de L. Zamenhof, publikigitaj de A. Holzhaus en la libro "Doktoro kaj lingvo Esperanto", 429-439 p.
14 tradukitaj poemoj de L. Zamenhof, publikigitaj de A. Holzhaus en la libro "Doktoro kaj lingvo Esperanto", 440-463 p.

Adolf Holzhaus


MEMORAJTOJ

Dum la jaro 1912 okazis en Krakovo la oka Univerŝala Kongreso de Esperanto. Mi estis tiam sekretario de la Esperanta Societo en la urbo Tarnov. La prezidanto de la Societo estis d-ro Eberŝon. Mi estis arkaŝo delegito de U.E.A., kiu tiutempe troviĝis en Genevo. Prezidanto de la U.K. estis prof. Otto Bujvid-konata kuracisto en Krakovo. Laŭ la kutimo ĉiu UK komenciĝas per solenaj salutaj paroladoj de la reprezentantoj de la diversaj nacioj, kiuj partoprenas la kongreson.

En la 8-a UK estis kelkaj judoj kaj ni decidis rajtigi unu de ni, s-anon Kvitner, instruiston de la hebrea lingvo, saluti UK en la nomo de la juda popolo. La sekretario de la UK d-ro Rosenŝtock tamen ne permesis tion. Lia motivo estis, ke "Judoj ne estas nacio". Nia delegacioturnis sin al d-ro Zamenhof, kiu loĝis en la Franca Hotelo en Krakovo. Li akceptis nin tre ĝentile, aŝskultis nian plendon, trankviligis nin kaj klarigis, ke la kontraŭuloj de Esperanto, la anoj de la lingvo Volapük, uzas antisemitajn argumentojn kontraŭ Esperanto, ĉar la kreinto de la lingvo estis judo. D-ro Z. petis: "ne tuŝu dum la UK la judan problemon, ĉar de tio nur suferos la movado". Li asertis, ke li estas nacia judo, ke li pruvis ĝin tradukante judajn klasikajn verkojn esperanten. Li tre petis nin: "ne parolu pri tio, ke la kreinto de Esperanto estas judo, ĉar oni batalas kontraŭ la movado per la argumento, ke Esperanto estis juda kreitaĵo.

Ni obeis lian peton kaj la 8-a UK malfermiĝis sen la juda saluto.

Trad. J. Levin
Rimarkoj de la tradukanto: d-ro A. Homet loĝas en Ramat Gan. Li estas historiisto kaj juristo. Li skribas multe pri la juda popolo en Galicio (poste Malgranda Polio).



KIAL KAJ KIEL INTERNACIAN STILON?

Lingvo, kiu pretendas esti internacia, devas havi internacian stilon, kiu enhavas la plej taŭgajn kaj bonajn formojn el ĉiu nacia lingvo, aŭ eĉ siajn proprajn formojn; sed domaĝas, se tiu stilo tendencas al iu nacia stilo aŭ al stilo de iu grupo de naciaj lingvoj. Ne malhelpas, se oni ne konas de antaŭe multajn vortojn, sed domaĝas, se al japano la stilformo de la internacia lingvo aspektas tute fremda kaj stranga kompare kun lia nacia lingvo.

Ĉiu lingvo havas siajn proprajn esprimojn kaj stilformojn. Tiuj formoj evoluas kun la lingvo kaj ŝanĝiĝas dum la tempo. Ili estas kreataj ĉefe per la kultura verkado kaj la literaturo de unu flanko kaj per la ĉiutaga parolo aliflanke.

E-o, kiel artefarita-novmaskita lingvo, ne havis fiksitajn kaj aprobitajn aŭ tradiciajn formojn, kaj estis libera krei siajn proprajn formojn, aŭ preni ilin de naciaj lingvoj.

Ofte, verkante, skribante kaj parolante en E-o oni senpense, nekonscie, laŭvorte tradukas esprimojn kaj formojn de sia nacia lingvo. Ĉiu el ni povas tion rimarki, se li havas korespondantojn de malproksima kulturo aŭ de alia lingva grupo. Ni diris, ke stilo de lingvo evoluas konforme al la verkado kaj parolo en tiu lingvo, kaj la supremenciita fenomeno en E-o malrapide sed daŭre enkutimigas naciajn stilformojn, ĉefe prunteprenitajn de eŭropaj lingvoj, ĉar la plimulto de E-a agado koncentriĝas en Eŭropo. Tiu ĉi nekontrolita senplana fenomeno evidente minacas la lingvan neŭtralecon de E-o.

Por bremsi kaj eviti tiun ĉi fenomenon endas agi en du niveloj: unue-de supere, eble la Akademio de E-o planu aĵ direktu tiun kreskon de stilo, prenante la plej bonan kaj taŭgan de ĉiuj naciaj lingvoj (eĉ verki originalan, se necesas) gardante la internacian karakteron de E-o.

Due - en la loka - persona nivelo - ĉiu klopodu pri-trakti la oficiale akceptitan stilon kaj eviti la uzadon de nacilingvaj formoj.

Amri Vandel

ĈU ESPERANTO ESTAS EŬROPA LINGVO?

Tiu iom provoka demando vekiga de tempo al tempo, ĉefe dum internaciaj kunvenoj kaj per orientlandanoj. Ĝi baziĝas sur la fakto ke (kaj tion oni devas konfesi) la plimulto de la radikoj en E-o devenas de la eŭropaj lingvoj, kaj tute ne estas vortoj el la orienta lingvoj.

Ĉi tiu fakto iel difektas la internaciecon kaj facilecon de E-o - ĉar ja oni povas konstati, ke tio malfaciligas la lernadon de la lingvo kaj aspektigas ĝin pli fremde por la neeŭropanoj kompare kun parolantoj de eŭroplingvoj.

Tiu opinio estas tute malprava, pro jenaj kialoj:
 1. La ĉefa punkto pro kiu E-o estas tiom multe pli facila ol ĉiuj naciaj lingvoj estas ĝia simpla gramatiko, kaj tio ja ne dependas de la radikoj kaj tial egalas al ĉiuj popolanoj.

2. E-o estas ja tamen internacia lingvo ĉar la internaciaeco ne kaŝiĝas en egala divido de vortoj (tiel, ke de ĉiu lingvo oni prenu similan kvantaĵda vortoj), sed la lingvo kandidatanta pri la tasko de internacia komunikilo devas esti facile lernebla, havi esprimeblecojn - almenaŭ kiel ĉies nacia lingvo - kaj esti klare komprenebla: kaj tiujn-ĉi avantaĝojn ja havas E-o.

3. Se oni jam utiligas naciajn radikojn, preferinde oni uzu kiel eble komunajn al multaj lingvoj, t.e. "internaciajn" en iu signifo - tio faciligas la lernadon (nur en la signifo de memorado de vortoj) al multaj lingvanoj, sed neniel malfaciligas ĝin al la homoj, kies nacia lingvo ne estas eŭropa.

Amri Vandel

Rabbi Selomo ben Jehuda

EVEN GABIROL

(Arabe: Sulejman Ibn Jaŝija)

/Latine: AVICEERON/

Malaga, 1020 (?) - Valencia, 1057 (?)
 Filozofo kaj poeto.

...ⲛⲓⲉⲛⲓ ⲛⲉⲕ, ⲛⲉ

Ho, Di' ! Atentas Vi al ĉiu mizerul',

Al mi silentas Vi lontana, en nebul'.

Por Via bon', el kor' mi dankas kun sincer'

Kaj petas pri favor', pri sort' de malsever'.

Mi turnas min kun preĝ' (ĉar estas mi nur polv')

Al Via glor', mister'. sen sci' pri ĝia solv';

Pri savo, mia reĝ', mi petas kun impet', -

Jen tuta la esper', ne pli ol tiu pet'...

tradukis J. Kohen-Cedek

M E M O R K A L E N D A R O

Ni ofte bezonas en nia ĉiutaga vivo scii la nomon de la tago en la semajno de iu ajn dato. Ekzistas pluraj sistemoj por solvi tiun problemon sen uzado de la ordinara kalendaro. Eĉ en la "Fundamenta Krestomatio" troviĝas tiucele kalendar sistemo, kiun la aŭtoro nomis "Fingra Kalendaro". Ĉi tie mi deziras prezenti procedon, kiun mi kreis aplikan la sistemon de la "Fingra Kalendaro". Mi nomis tiun procedon "Memorkalendaro", ĉar la problemo povas esti solvata memore, sen uzi la fingrojn aŭ aliajn helpilojn.

La problemsolvado postulas la uzadon de du nombroj: **J a r a n** kaj la **m o n a t a n** koeficientojn.

La jara koeficiento estas malsama por la diversaj jaroj, sed ni povas facile trovi ĝin sciante, ke ĝi estas 2 por la jaro 1977. Por la sekvantaj jaroj la koeficiento malgrandiĝas po unu, se la jaro estas simpla kaj po du por la superjaro. Ĝi malgrandiĝas ĝis nulo kaj poste ĝi ricevas valoron 6, kaj denove malgrandiĝas. Jenaj estas la jara koeficientoj por kelke da estontaj jaroj:

Simpla jaro 1977 -2

" " 1978 -1

" " 1979 -0

Superjaro 1980 -6 por Januaro kaj Februaro, 5 por la ceteraj dek monatoj

Simpla jaro 1981 -4

" " 1982 -3

" " 1983 -2

Superjaro 1984 -1 por Januaro kaj Februaro, 0 por la ceteraj 10 monatoj

Simpla jaro 1985 -6 k.t.p.

La monataj koeficientoj estas nevariemaj por ĉiuj jaroj. Por scii ilin ni devas memori la sekvantan frazon de dekdu vortoj reproduktitaj de la "Fingra Kalendaro":

Alta Dia Dono,
 Granda Ben', Espero:
 Gvidu Ĉion Firme
 Al Dezira Fino.

Ni eksplikos la trovadon de la monataj koeficientoj pere de du ekzemploj:

1. -Kio estas la koeficiento de Marto? - Marto estas la tria monato de la jaro. La tria vorto de la frazo estas "Dono", kies unua litero estas "D". Pro tio ke "D" estas la kvara litero de alfabeto, la koeficiento de Marto estas "4".
 2. Elserĉu la koeficienton de Septembro. - Septembro estas la naŭa monato de la jaro. La naŭa vorto de la frazo (Firme) komenciĝas per "F", kiu estas la sesa litero de la alfabeto. Do, la koeficiento de Septembro estas "6".

La diferenco inter la monata kaj la jara koeficientoj estas nombro, kiun ni nomu "la monata indico", aŭ mallonge, **i n d i c o**. Tiel do, la indico de Marto en la jaro 1977 estas

tas 4 - 2 = 2, kaj de Septembro 1977 estas 6 - 2 = 4.

Rimarko: Se la monata koeficiento estas pli malgranda ol la jara koeficiento, oni devas adicii la nombron "7" al la monata koeficiento por kalkuli la indicon. Ekzemple, se la monata koeficiento estas "1" kaj la jara koeficiento "5", ni kalkulas la indicon jene: $(1+7) \cdot 5 = 8-5=3$.

Sciante la monatan indicon estas facile trovi la nomojn de ĉiuj tagoj de tiu ĉi monato. Por tio oni adicii la indicon al la nombro de la tago de la monato, dividu tiun ĉi sumon per 7 kaj la resto de tiu divido indikas la nombron de la tago en la semajno.

Rimarko: La unua tago de la semajno estas laŭ la juda sistemo dimarĉo (ne lundo).

Ekzemploj: 1. - Kiu estas la tago en la semajno la 17-an de Majo 1977? Majo estas la kvina monato en la jaro. La kvina vorto de la sistema frazo "Beno"-komenciĝas per la litero "B", kiu estas la dua litero de la aboco; do, la monata koeficiento estas "2". Pro tio, ke la jara koeficiento de la jaro 1977 estas "2", la indico de tiu monato estas $2-2=0$. Rezultas de tio, ke la sumo de la tago (17) kaj de la indico (0) estas $17+0=17$. Dividante 17 per 7 oni ricevas 2 kaj la reston 3, do la tago estas mardo.

2. - Difinu la tagon de la 14.10.1977. La deka vorto "Al" de la sistema frazo komenciĝas per "A", kiu estas la unua litero de la alfabeto. Sciante, ke la jara koeficiento de tiu jaro estas "2" ni kalkulu la indicon: $1+7 \cdot 2 = 6$. (Ni adicii 7, ĉar 1 estas pli malgranda ol 2). Do, $14 + 6 = 20$, kaj la resto, post la divido de 20 per 7, estas 6. Rezultas de tio, ke la tago estos vendredo.

3. Trovu la datrevenon en la jaro 1978 de la morto de d-ro Zamenhof (la 14-an de Aprilo).

La jara koeficiento en la jaro 1977 estas "2" kaj ĝi estos "1" por la jaro 1978. La kvara vorto de la frazo "Granda"-komenciĝas per la 7-a litero de la aboco. Sekvas, ke la indico estas $7-1=6$. La tago estos, do, vendredo.

Nun, kara leganto, vi povos scii la tagon de la semajno por ĉiuj datoj sen uzo de via poŝkalendaro. Sed ne forfetu ĝin! Donacu ĝin al iu, kiu ne scias plenumi la plej facilajn aritmetikajn operaciojn.

Z. Dimant



ESPERANTO-INSTRUISTINO EL TOKIO EN ISRAELO

Tamiko Kaŭkami Nielsen, instruistino de Esperanto, vizitis Israelon inter 19.dec.1976- 2.jan. 1977 kun sia nova edzo, Esperantisto Asbjørn Nielsen. Tamiko vizitis 94 landojn kiel prelegistino de Esperanto. Ŝi parolis pri Japanio kun lumbildoj, montris japanan tradicion dancan, aŭdigis muzikon de Japanio kaj Norvegio, dancis norvegan tradicion dancan, kiun ŝi lernis dum 7 jara restado tie. Krome ŝi prezentis japanan paperfaldadon -fari florojn, bestojn, birdojn el kvadrataj paperoj.

Tamiko eklernis Esperanton antaŭ 13 jaroj de sia avo, okulkuracisto en Tokio. Esperanto estas la plej facila lingvo por japanoj, tamen ŝi uzis 10-oblan penon ol israelaj lernantoj. Do oni komprenas, kiel malfacile estas lerni la anglan aŭ la francan lingvon. Ŝi ne sukcesis el-lerni aliajn lingvojn ol Esperanto kaj ŝi uzis nur Esperanton dum sia vojaĝo tra la mondo. Ŝia edzo lernis dum 5 jaroj anglan, germanan kaj francan lingvojn, sed nur la anglan li parolas. Li rakontas: la angla lingvo ne helpas kontakti homojn kiel Esperanto. Per E. oni tuj trovas gestamikojn, ricevas invitojn por logi kaj ĝuas varman gastigadon kiel malnovaj konatoj. Li estas akceptata kiel filo aŭ frato de multaj esperantistoj. Ili geedziĝis en la jaro 1974 kaj poste vizitis kune Anglion, USONON, Tahiti, Nov-Zelandon, Singaporon, Sovetunion, Koreon kaj Japanion. Speciale en Japanio Esperanto estis la sola helpilo, ĉar tie eĉ instruistoj de angla lingvo ofte ne kapablas paroli angle. Tamiko substrekas, ke ŝia vojaĝo neniam estis ebla sen helpo de E. Nun ŝi estas bibliotekistino en Vernejo en Oslo. Ŝi gvidas kursojn por plenaĝuloj, pensistoj, studentoj kaj lernantoj. Ŝiaj lernantoj korespondas kun pli ol 20 landoj en la mondo kaj kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Niaj gastoj laŭ sia pritakso ĝuis la agrablan veteron kaj gastamon de la israela popolo. Ili vizitis Jerusalemon, Hajfon, Natanion, Tel-Avivon kaj Jerifon. Ili ĉeestis la Zamenhofan feston kun israelaj kantoj tradukitaj Esperantiten. Ankaŭ la ĉeesto de multaj gejunuloj tre impresis ilin, ĉar ĝi montris antaŭeniron de nia lingvo.



(Soneto)

Descendis mi el monta fendo
Ejn-Gedi, al vinbergardeno,
Al val' de Altkanta legendo
Pri l' amo kaj ĝia Edeno.

Kaj kiel gazel', aŭ cervido,
Embuske, ĉe akva la fonto,
Mi revis en kora avido
Pri... kun Sulamit' rerenkonto.

Ŝprucfluis Kaprida la Font',
Sen mirho, sen nard' estis mont',
Kaj sen belulin' Sulamit'...

Resonis sed Plej Alta Kant'
En aer', bonodora pro plant',
Kun eterna sopir' pri la mit'...

elhebreigis J. Kohen-Cedek.

Ŝlomo Špan (1898-1962),
edukisto, publicisto kaj poeto,
okaze de 15 jaroj post lia morto.

* Ejn-Gedi- laŭvorte: "Kaprida Fonto", -loko apud La
Morta Maro, menciita en la Salomona Plej Alta Kanto
(I,14) pri la amo de Sulamit'.



Turisma angulo

E J N G E D I

Ejn Gedi estas kibuco ĉe la Morta Maro. Ĝi situas sub la mara nivelo kaj dividiĝas je du partoj: malnova, plimalalta kaj pli nova, sur la monteto keldek metrojn alta. La novaj domoj estas pli modernaj kaj adaptitaj al la tre varma klimato. La tegmentoj estas konstruitaj duonon da metro super la muroj, por ke la varmigita tegmento de la sunradioj ne varmigu la ĉambrojn malsupre. Ĉiuj ĉambroj estas malvarmigataj per klimatiziloj, ĉar alie la vivo estus tie preskaŭ ne tolerbla. Malgraŭ tio la kibucanoj, kiuj antaŭ kelkdeko da jaroj decidis loĝigi tiun regionon, devis multajn jarojn vivi en nehomaj dezertaj kondiĉoj, longe ĝis ili sciopovis aĉeti tiun ilon por iomete faciligi al si la vivon. La temperaturo dum la someraj monatoj kaj dum la ĥamsin-

-naj tagoj de printempo atingas 45° de Celsiuso. La aero estas seka kaj pasas kelkaj jaroj ĝis iam tie pluvas. La meza kvanto da pluvo estas tie 25 mm dum la jaro (kompare kun 500 mm en Tel Avivo). Malgraŭ tio en tiu seka ĉirkaŭaĵo estas fluantaj torentoj dum la tuta jaro. En Ejn Gedi mem estas du tre pitoreskaj riveretoj kun multaj akvofaloj. Ĉirkaŭ la torentoj kreskas abunde preskaŭ ĝangala vegetalaro. Oni povas tie promeni iomete grimpante kaj vidi ne kutiman pejzaĝon de dezerto: koloraj dolomitaj rokoj, de vegetaĵo oaza, de kulturataj kampoj, de pitoreskaj domoj de kibuco. En la supra parto de norda rivereto troviĝas malluma mezgranda groto kovrita per malseka musko. En tiu groto kaŝis sin laŭ la legendo antaŭ preskaŭ 3000 jaroj la reĝo David, kiam li devis fuĝi por ne esti kaptita de la tiama reĝo Saul. La loko estis tiam preskaŭ ne atingebla kaj pro tio li sciopovis longan tempon travivi tie kiel fuĝinto. Supre de tiu groto oni trovas restaĵojn de la loĝantaro de antaŭ 6000 jaroj kun restaĵoj de templo de tiu loĝantaro.

Se iu volas iomete fortstrefi, li povas grimpi (facile, sed varme; ne forgesu preni kun vi kelkajn litrojn da akvo por trinki, ĉar ŝvitado povas danĝerigi la vivon en tiu temperaturo). Li atingas la supron, rokan pinton tre krutan 100 m super la mara nivelo, sed 500 metrojn super la Morta Maro. La grimpado estas facila sed postulas forton kaj lertecon. La pejzaĝo de la supra pinto estas neimageble bela. La dua rivereto - Nahal Arugot - estas tute alia, ĝi trapasante la rokojn fosas al si belkoloran kanjonon, kiu estas tre vidinda.

La kibuco mem dum la lastaj jaroj tre evoluis de kiam ĝi estas ligita per du modernaj ŝoseoj kun la centro de la lando kaj havas ankaŭ flughavenon por malgrandaj aviadiloj, kiuj servas al la kibuco por transporti la plej bonajn fruktojn kaj legomojn por eksportado al Eŭropo. La fruktoj havas speciale altan prezon pro sia bongusto, sed ankaŭ pro tio, ke ili maturiĝas pli frue ol ie ajn en alia loko; ili estas maturaj jam en februaro kaj en la komenco de marto.

En Ejn Gedi estas ankaŭ resaniĝejo por la reŭmatis-
muloj kaj por psoriaz-malsanuloj. Laŭ la lastaj sciencaj
kuracistaĵaj raportoj dum la lasta medicinista kongreso en
proksima loko evidentiĝis ke, la sunradiado, varma temper-
aturo, sekeco kaj aldona bano en la sala maro donas longan
remiton de la simptomoj. Ĝi estas jam oficiale akceptita ki-
el kuracloko por malsanuloj de kelkaj eŭropaj malsanul-
kasoĵ. Bedaŭrinde la loko pro siaj ecoj estas tro malgranda
por akcepti ĉiujnserĉantojn kurachelpon kaj oni devas sufi-
ĉe frue mendi la lokon. (Rimarko: en proksimeco estas alia
loko kun pli multaj hoteloj, sed pli modernaj kaj pro tio
pli multekostaj. Estas homoj, kiuj preferas logi en la urbet
Arad, 600 metrojn super la maro, kaj 1000 super la Morta
Maro kaj ĉiutage per aŭtobuso malsuprenveturi por ricevi
kuracadon. Oni asertas, ke pro la klimato kaj pro la prezo
ĝi estas pli oportuna). Oni devas ĉi tie aldoni, ke la ak-
vo en la Morta Maro, kies nomo estas ankaŭ Sala Maro, enhav-
as 28 procentojn da salo, do ĝi estas preskaŭ saturigita
solvaĵo de la salo. Ĝi kaŭzas porsin banantoj surprizojn.
La homo ne scianta naĝi, ne dronas kaj eĉ ne sinkas, ĉar la
pezo de la akvo superas mezan pezon de la homo. Estas "naĝan-
toj" kiuj kuŝas sur la akvo kaj ne movante la piedojn kaj la
manojn legas ĵurnalon. La alia surprizo estas, ke ĉe la bordo
de la salo kristaliĝas sur la ŝtonoj kaj aliaj objektoj kaj
formas tre mirindajn bildojn-skulptaĵojn.

H. Mašler



La israelaj ĵurnaloj sciigis pri sukcesa elbordo de
arteza puto en la profundeco de 500 metroj. La minerala ak-
vo, kiu enhavas solvaĵon de boro, jodo, hidrogena karbido,
kalcio, natrio, kalio, magnezio kaj mangano, spru-
cas per sia premo kaj estas 39° de Celsiuso varma. La puto
donas 500 kubajn metrojn da akvo dum horo. La puto
estas ĉe la marbordo de la Morta Maro, 18 km. de Ejn Gedi.
La akvo povas esti uzata sen varmiĝo en bankuvoj kaj donos
novajn kuraceblecojn al niaj kuraclokoj ĉe la Morta Maro.
Dum la lasta jaro oni kalkulis, ke ĉe la Morta Maro la
gastoj kaj sin kuracantoj pasiĝis unu milionon da tagoj,
kaj elĉerpis tute la eblecon akcepti pli multajn gastojn. Nun
post la lasta sukceso oni jam planas kaj komencas konstrui
du aldonajn grandajn hotelojn kaj pro la problemo de la dol-
ĉa akvo ĉe la Morta Maro, oni pripensas per la tuboj kondu-
ki la akvon al la proksima bele situanta urbeto Arad kaj
tie organizi novan kaj modernan kuraclokon.

H.M.

BRILDIRAĴOJ

1. Por ĉio estas sezono kaj tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno (La predikanto, 3).
2. La geedziĝo estas la plej efika kuracilo kontraŭ la amepidemo.
3. Pacifisto estas homo, kiu batalas kontraŭ ĉiuj, krom siaj malamikoj.
4. Pli forta estas la lego de amo, ol la amo de la lego.
5. Pli bona estas seka peco da pano, sed kun trankvil-eco, ol domo plena de viando kun malpaco. (La sentenc-
oj de Salomono, 17).
6. Ĉiu volas longe vivi, sed neniu volas maljuniĝi.
7. Pli facile estas penti pri pekoj faritaj ol pri ti-
uj, kiuj estas farotaj.
8. Ne nenigas bonaj virtoj la malbonajn, samkiel mielo miksiĝa kun veneno ne nuligas ĝian venenecon.
9. Se temas pri siaj aferoj, homo estas realisma; sed rilate alies aferojn, li estas idealisto.
10. La statistiko montras, ke 50% de la geedziĝinta lo-
ĝantaro en nia lando estas virinoj.
11. Kiu estas nenionhava, tiu estas nenionsulda.
12. Foje homoj falsas monon, sed pliofte la mono falsas la homojn.
13. Sub tirana reĝimo estas deviga ĉio, kio ne estas malpermesata.
14. Ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro. (L.L. Zamenhof).



NOKTOMEZ' PISIS JAM

- I. Noktomez' pisis jam
Ne estingiĝis luna lumo
Ĉar antaŭ estingiĝ' de l'brila stelar'
Donata estas moment' al amantar'. (dufoje) *
- Refreno:
Morgaŭ estos nova tag'
Sed kion jam alportos nova tag'
Do donu al ni momenton, nur momenton
Kvankam noktomezo pasis jam. *
- II. Noktomez' pisis jam
Oni matenon ne lumigis
Ĉar antaŭ forigado de l' hieraŭa tag'
Pludaŭras iomete ama ag'. (Refreno). *
- III. Noktomez' pisis jam
Oni la sunon ne lumigis
Ĉar antaŭdisdonad' de l'lekta botelar'
Donata estas moment' al amantar'.

Amos Ettinger
muziko: Nurit Hirs
traduko: David Mager

UNUA KISO

Kiun sorĉon karulino
faris vi al mia kor',
festa estas nun sen fino
ĉiu tago, ĉiu hor'.

Wian manon mi nur tenis,
trapasis min tuj varma ond'.
Mi kisis vin dum ni promenis
balanciĝis tuta mond'.



Donis vi al mi flugilojn,
ŝvebas mi en la aer'.
Malpeziĝis la piedoj
eĉ pasante sur la ter'.

Ebriiĝis mi sen vino, ĝen'.
kantas, fajfas mi sen ĝen'.
Nektar' de l' kis' en mia spino
dum tago, nokt', vesper', maten'.

Neniam trilis tiel bele
ĉiuj birdoj en arbar'.
Neniam brilis tiel hele
ĉiuj steloj super mar'.

Ĉie ajn en mia menso
zumas gaja melodi'
sola estas mia penso:
estis ĉiam nur kun vi.

J. Giladi



ANGULO DE JELI

RIDEANTANTA VORTARO

Balkono: Kiam la geamantoj interkonatiĝis dum festeno.
Barbaro: Grupo de vang- kaj mentonharoj.
Bastono: Plej malalta vira voĉo.
Batato: Batata persono aŭ objekto.
Diamanto: Piulo.
Itima: Viro timanta la inojn.
Karbono: La malo de Malkara Malbono.
Koloro: Virina ornamajo portata ĉirkaŭ la kolo.
Kompoto: Simile al punktopoto ktp.
Kulturo: Tre alta konstruaĵo, en kiu svarmas la kuloj.
Muskolo: Organo kuniganta la muskapon kun la muskorpo. (W.Auld)
Panoramio: Inklino de certaj amantoj.
Parfumo: Rezulto de duopa cigaredfumado.
Parlamento: Longa vekria plendo (post la geedziĝo).
Partero: Parto de la parto.
Satiro: Marŝo de revenintoj el manĝejo.
Sekundo: Seka hundo senkapa.
Sofisto: Persono kuŝanta sur kanapo kun dikaj kuseroj.
Dato: Ummura tempo de iu okazaĵo.
Stratosfero: Medio de la strato.
Ekrano: Subite aperanta rano.
Ekstero: Sablo.
Sekreto: Reto enhavanta neniom da akvo
Vetero: Tombejo.
Kavaliro: Alpaŝo al kaverno.
Programo: Sufiĉa kaŝzo ĉe "pezgardantino" por ekobservi severan dieton.
Kulinara: Rilata al grupo de inseksaj kuloj.
Kristalo: Brua loĝejo por brutoj.
Aŭgusto: Kiam oni ne povas konstati ĉu la gusto estas bona aŭ ne.
Horloĝo: La adreso de la horo.

Josef Šemer

DELEGACIO DE JELI INVITATA AL GERMANIO

La plano de la junular-interŝanĝo inter JELI kaj GEJ (Germana Esperanto-Junularo) traktita ekde la somero, efektiviĝis fine. Temas pri vizito de JELI-grupo en Germanio (FR) ĉi somere, kaj lasttempe la koncernaj instancoj en Germanio aprobis subvenciojn por la afero. Sekve GEJ invitis delegacion de JELI por vizito. Ĝi okazos la 24-29 de Julio. La programo estas ebunda kaj poste eblos daŭrigi al la UK kaj la IJK. Revendato: 18.08.77.
 Pri la detaloj demandu s-anon A. Vandael, tel. 235593.

ESPERANTO EDZPERANTO

(aŭ: tiel ĝi komenciĝis).

-"Pardonon!" Ĉarma, juna fraŭlino rigardis de la antaŭa fenestro de la "Peugeot 404". "Eble vi scias, kie troviĝas N-220/1?" ŝi demandis. "Mi scias nur ke ĉi tie estas Kirjat Nordaŭ; ankaŭ mi serĉas adreson kaj ne povas trovi."

Mi preskaŭ forveturis, sed tiam tiu 220/1 ŝajnis al mi konata de ie. Mi rigardis la foliojn, kiun mi havis - tiam evidentiĝis, ke mi vere pravis: "Ĉu vi serĉas familion Zeevi hazarde?" "Ĉu vi estas samideano?" ŝi respondis demande. "Vere", mi diris, "venu serĉi kune".

La blanka "Eskort" ekveturis vojen; la fraŭlino en la ruĝa "Peugeot" sekvis min.

Ni serĉis ĉi tie, rigardis tie, sed ne trovis. Ankaŭ la mapeto ne helpis. "Ŝe ni ne trovos, ĉu vi venos kun mi al filmo?" mi demandis. Ĉarma rideto estis la respondo. (Ĝis nun mi ne scias, ĉu ĝia signifo estis JES aŭ NE).

Ni daŭrigis serĉi. "Tio estas ĉi tie", mi diris. "Ĝuste, ŝi respondis". En la enirejo mi demandis: "Kiu estas via nomo?" "Nira" ŝi respondis, "kaj vi?" - "Avi".

La kunveno de JELI estis tre interesa. Mi vere ne memoras, kiuj estis la temoj (certe estis enigmaro), sed oni parolis pri israelaj urboj...

"De kie vi venas?" - "Mi loĝas en Herclia." "Ĉu vere? mi havas geonklojn tie, kaj mi pensas, ke mi vizitos ilin baldaŭ; eble la venontan sabaton." "Vi povas veni viziti" Nira diris.

Nian unuan komunan vesperon ni ĝuis en "Pub Klubo". Multaj aliaj vesperoj sekvis ĝin. Propagandaj ekskursoj kun aliaj e-istaj paroj en la blanka "Eskort" kun la verda flago... kaj la tempo pasis.

La unuan fojon ni venis al la kunveno per du diversaj aŭtomobiloj. Al la dua kunveno en Kirjat Nordaŭ ni venis jam nur per unu. Por la venonta JELI - kunveno kiu okazos ĉe Sigal kaj Gabi Zeevi, ni ricevos nur unu invitleteron: "al familio Gal"...

Avi (Gal) kaj Nira (Frenkel).



PRI NIA MOVADO KAJ AGADO

LA DATREVENO DE LA NASKIĜTAGO DE D-RO ZAMENHOF

Ĉiujare nia societo festas la datrevenon de la naskiĝtago de la kreinto de nia lingvo. Tamen ĉijare tiu datreveno estas festita tre solene.

En la granda kaj impona salono de Bet Jad Levanim, orn- amita per nacia kaj verda standardoj kaj la bildo de D-ro Z., kunvenis granda nombro de niaj novaj kaj malnovaj gesamidea- noj de ĉiuj partoj de nia lando. Ĉeestis ankaŭ gastoj el Ja- panio, Usono, Rumanio, Norvegio kaj Nederlando. Per "La Espero" estis malfermata la festo. La prezidanto A. Manor donis parol- rajton al s-anoj Kohen Cedek kaj Perlman, kiuj parolis elok- vente hebrece kaj esperante pri nia Majstro kaj lia genia kre- itaĵo.

Sekvis la literatura parto de la festo, aranĝita per- fekte de nia malnova, fervora kaj ĉiam vigla s-ano D. Wun- derbaum. Oni aŭdis belajn kantojn-naciajn kaj esperantajn, artajn deklamojn de niaj junaj kaj kapablaj adeptoj de nia lingvo, kiuj vere entuziasmigus la ĉeestantojn.

Fine oni aŭdis la orkestron de la pensiuloj, kiu aŭdi- gas popolajn kantojn akompanitajn de la tuta ĉeestantaro kaj kelkajn klasikajn komponaĵojn. Speciale ekscitis nian aron la junulino Vered per siaj belaj kantoj. La kantistinoj kaj la so- listoj ricevis bukedojn da floroj.

La granda nombro de la partoprenantoj montris kaj bruv- vis, ke la estraro de nia movado devas eluzi ĉiujn okazintaĵ- ojn por ĉiam kunvenigi nian samideanaron, kiu estas interesi- ta kune festi, ĝoji kaj kune labori por nia sankta celo.

D-ro J. Beŝar



LETERO DE J. KOHEN-CEDEK

Tre kara samideano D. Wunderbaum

Mi ankoraŭ ĝuas la rememorojn pri la granda sukceso de la Zamenhofs Vespero, atingita ĉefe danke al viaj penoj kaj prizorgado. Pri la sukceso parolis kun mi ankaŭ s-ano B. Ben Jaakov kaj s-ano J. Murĵan, kiu okaze min vizitis. Tial mi decidis scribi al vi kaj rigeti mian kontenton pri la plezuro, kiun vi kaŭzis al mi ĉiuj per via bonega aran- ĝo.

Salutas vin bondezire
J.K.C.

NIA KLUBAGADO

Antaŭ kelkaj monatoj la tel-avivaj Esperantistoj sukcesis akiri novan ejon por la ĉiusemajnaj klubkunvenoj. Kvankam la malnova loko estis sufiĉe kontentiga, la nova klubejo estas grandega kaj preskaŭ luksa. En la antaŭĉambro estas artekspozicio kaj tie oni povas admiri belajn bildojn kaj skulptaĵojn. Dum la klubaj vesperoj funkcias biblioteko.

En nia nova klubejo ni volonte ricevas gastojn kaj ni mem ĝuas nian salonon.

La eksterlandaj gastoj ofte vizitas nin en Tel Avivo. Preskaŭ ĉiuvespere (ĵaŭde) venas vizitantoj de diversaj lokoj de la mondo. Samideanino de Finnlando kelkajn fojojn denove kaj denove al ni revenas. Ŝi laboras en kiu buco. Ĉi tiun fojon ŝi intencas resti tie dum pli ol unu jaro. Antaŭ ne longe vizitis Japanino kun sia edzo, kun kiu nun ŝi loĝas en Norvegio. Ankaŭ ŝi estas ŝatata kaj konata de multaj israelaj Esperantistoj. Cetero ni havis gastojn de Usono, Germanio, Meksikio, Rumanio, Argentino, Svedio, Anglio, Francio, Jugoslavio kaj de multaj aliaj landoj.

Tre ĝoje estas bonvenigi novemigrintojn, kiuj plifortigas nian aron. De Polio venis amikoj de unu el niaj samideanoj - la tuta familio de fervoraj esperantistoj.

Interese estas ankaŭ, kiam niaj propraj klubanoj revenas hejmen post rondvojaĝo en la mondo kaj rakontas al ni pri siaj travivaĵoj, kelkfoje eĉ akompane de diapositivoj.

Ester Haroun

KLUBAJ VESPEROJ

Manor: Trarigardo de la esp. gazetaro
Zamenhofa vespero
Ben Porat: Lumbildoj
Beŝar: Muziko kaj Esperanto
Ben Alter: Pri la juda folkloro
Interparolo: Pri esp. amikeco
Alberg: Mia vizito en Usono
Vespero de humuraĵoj. (Ĉiuj rakontis)
Vinograd: Lumbildoj de Norvegio
Perlman: La plej gravaj eventoj en la jaro 1976
Ron: Pri Usono
Landa Konferenco
Maŝler: La lasta numero de Heroldo

LA TEL-AVIVA KLUBEJO

Ek de Decembro 1976 okazas ĉiuj klubaj vesperoj en nova loko: Bejt Jad Labanim, str. Pinkas 63, Tel-Avivo.

Ĉiuĵaŭde estas je dispono de nia samideanaro la luksa grandega salono de tiu ĉi domo dum la horoj 19-21.30.

Ankaŭ la biblioteko de ELI funkcias tie ĉiuĵaŭde vespere.

0 0 0 0 0



H E L P O D E U R B E S T R A R O

La Tel Aviva urbestraro en la lasta jaro tre abunde helpas al nia movado. ELI ricevis de la urbestraro ĉi jare senpage ne nur du ĉambregojn por la kursoj en la Junulara domo, sed ankaŭ salonon por niaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj. Krom tio en la sama domo ni povas uzi ĉambrojn por la estraraj kunsidoj. La urbestrara kultura fakoj helpis al ni ankaŭ en informado pri Esperanto presigante la afiŝojn, kiuj sciigas pri novaj kursoj kaj disgluante ilin sur la stratoj dufoje dum la jaro po unu semajno.

ELI scipovis dank' al tiuj agoj malaltigi la prezon de la kursoj ĝis 50 IL por la tuta kurso por plenkreskuloj kaj 35 IL por lernantoj, studentoj kaj soldatoj. La prezo de la kurso estas simbola (10 IL = 1 USONA dolaro) kaj certe ne estas obstaklo por kandidatoj, kiuj intencas lerni nian lingvon. De alia flanko ankaŭ urbestraro ne perdas ion per sia helpo, ĉar de nia flanko ni helpas al la urbestraro almultekoste agi en la kultura kampo kaj pli reale-ni akceptas membrojn de la Junulara Domo senpage al nia kurso.

ELI de sia flanko ĉi tie esprimas sian dankemon al la urbestraro kaj esperas, ke nia komuna agado daŭros kaj ankaŭ aliaj urbestraroj lernos de tiu simbiozo kaj de ĝi profitos.

I N F O R M A J P Ĥ E L E G O J

En la lasta tempo okazis prelegoj pri la Internacia Lingvo en jenaj lokoj:
"Technion" (Politeknika altlernejo en Hajfo)-prelegis d-ro H. Maŝler antaŭ 100 studentoj.
Gimnazio "Alef" en Tel Avivo -prelegis d-ro H. Maŝler antaŭ 150 gelnantoj.
Gimnazio "He", Tel Avivo -prelegis A. Vandel kaj G. Graf antaŭ 40 gelnantoj.
Klubo de la pensiuloj en Tel Avivo -prelegis A. Manor antaŭ 50 memtroj.

INTERVJUOJ PRI ESPERANTO

En unu el la plej legataj ĵurnaloj (Jediot Aĥaronot) aperis dupeĝa intervjuo pri Esperanto kaj pri esperantomovado en la mondo kaj en Israelo. La intervjuantino faris tre precizan laboron intervjuante ne nur d-ro'n H. Maŝler kaj A. Vandel, sed ankaŭ vizitante la unuan lecionon de la ĵus komencita kurso, ĵurnalaran rondon kaj kluban vesperon en nia klubejo.

(Por eksterlandanoj: dupeĝa artikolo en la hebrea lingvo egalas al tripeĝa artikolo en iu el la eŭropaj lingvoj, ĉar en la hebrea lingvo oni ne skribas vokalojn kaj la vortoj estas mallongaj, ĉar plimulto de la hebreaj radiokoj enhavas nur 3 konsonantojn.)

La artikolo enhavas ankaŭ 5 fotografajojn. Ĝi estis tre vigle kaj interese skribita kun tre riĉa enhavo kaj pri-traktas multajn detalojn pri nia movado en Israelo kaj en la mondo. Efikon de la artikolo oni povas prijuĝi per la multnombraj telefonoj, kiujn ricevis Estraranoj de ELI kun petoj pri aldonaj informoj.

o o o o o o o o o o

En la pollingva ĵurnalo "Nowiny i Kurjer" aperis is unu-paĝa intervjuo kun mgr. Dratver pri d-ro L.L. Zamenhof pro 90 jara datreveno de lia unua broŝuro pri Esperanto. La intervjuo donas detalsajn informojn pri la kreinto de nia lingvo, sed tute ne tuŝis nuntempan esp. movadon en Israelo. La artikolo estis tre interesa kaj tre utila por la legantoj, kiuj ne estis informitaj pri la verko de nia majstro.

Responde en mallonga letero al la redakcio d-ro H. Maŝler ionis informon pri nia movado kaj ĝiaj atingajoj. La redakcio presigis ankaŭ la respondon.

En la pollingva semajna gazeto "Przeгляд" aperis traduko de la intervjuo en "Jediot Aĥaronot". La traduko estas iomete mallongigita, sed okupas tre paĝojn kun unu fotografajo. Ambaŭ artikoloj evidentiĝis tre efikaj, ĉar la petoj pri informoj ne ĉesas veni kaj se ELI sukcesos ricevi ejon por la kurso komenciĝos baldaŭ tria kurso por la komencantoj.

o o o o o o o o o o

En la ĵurnalo "Jediot Aĥaronot" aperis sciigo pri la vizito en nia lando de ges-anoj Tamiko Kaŭkami kaj Asbjørn Nielsen. (vidu artikolon en tiu ĉi numero).

En la bulteno de la radioamatoroj "Hagal" aperis artikolo de la ĵunaĝa s-ano Eran Rebiŝ sub la titolo: "Esperanto kaj Radio-Satokupo".

MENDOJ DE REVUOJ

Nia peranto Jeĥiel Ben Alter, Petaĥ Tikva, p.k.379, sciigas pri la prezoj por abonoj kaj SAT-kotizo por la ĵaro 1977:

SAT-kotizo kun Sennaciulo - 101 IL
Sennaciulo 60 IL
Horizonto 84 IL
Heroldo de Esperanto 104.70 IL aerpoŝte
" " 147.70 IL
Internacia Muzeo 35 IL
Biblia Revuo 60.30 IL

La prezoj plialtiĝis pro la devaluado.

Bonvolu sendi la monon per poŝtbanko n-ro 4-45854-8.

Aldono: Sennacieca Revuo - 20 IL.

NOVA DELEGITO DE U.E.A.

Kirjat Jam havas Delegiton de U.E.A.-S-ano Mizeruĥa Ŝmuil akceptis tiun funkcion.

Ni memorigas, ke antaŭ kelkaj ĵaroj s-ano M., estinte novemigrinto al Israelo, eldonis helpe de ELI sian "Ŝtancilan vortaron". ELI gratulas lin kaj esperas ke li daŭre kun nia aro kunlaboros.

o o o o o o o o o o

KANDIDATO POR KOMITATANO "B"

Delegitoj de UEA en Israelo elektis s-anon Tilleman, kiel kandidaton por Komitatano "B" en UEA.

o o o o o o o o o o


I S R A E L O 1 9 7 6

La turisma informilo Israelo 1976 estas multnombre dissendata al diversaj landoj. La petoj pri la broŝuro venis amase post kiam "Esperanto" kaj "Heroldo" sciigis, ke ĝi estas ricevebla ĉe ELI kontraŭ internacia respondekupono. Por la ricevitaj respondekuponoj ELI mendis tri librojn de Jossef Nassif; la libroj jam estas en nia biblioteko. Menditaj estas ankaŭ ĉe li 4 arabaj vortaroj kaj lerolibroj. Bedaŭrinde ĝis nun ni ilin ne ricevis.

Ni memorigas: La informilo estas ricevebla en Israelo ĉe d-ro Maŝler por 1 IL, (kun poŝtelspezoj: por 1.60 IL.) Por eksterlandanoj: por 1 RPK.) Ĝi povas esti uzata kiel donaceto por niaj eksterlandaj amikoj.

NOVAJ GESAMIDEANOJ

Berlinerblau Ĵoĥanan
 Bielicki Nava
 Ejlion Simon
 Faklieru Aviv
 Judoviĉ Seli
 Kacir Ezra
 Klejman Raaja
 Landau Matilda
 Lauffer Jehudit
 Seftel Bronia
 Soham Sara
 Vegh Ernest
 Vegh Relly
 Veksler Janir
 Lau ĉalil
 Oved Efram
 Ilan Jaron
 Gros Simĥa



LA KVARA ELDONO DE LA LERNOLIBRO TURNO/MASLER

Pro la plivigliĝo de nia movado ankaŭ la forvendado de la lernolibro por la komencantoj plirapidigis. La tria eldono de la lernolibro (1973) jam elĉerpigis kaj nun jam estas en la presejo la kvara eldono.

La libro estas havebla ĉe d-ro Mašler. Prezo: 15 IL.

K U R S O J

En Tel Avivo komenciĝis 2 paralelaj kursoj por la komencantoj. Gvidas ilin d-ro H. Mašler kaj J. Murĵan. Partoprenas la kursojn 50 gelemantoj, grandparte junaj. En Natanja daŭras la kursoj de R. Alberg kaj G. Zeevi. En la klubo de pensiuloj gvidas la kurson prez. A. Manor. Pri la komenco de kurso en Beer Sebo sciigas D. Mager.

J a r k o t i z o

Ĉiuj gesamideanoj estas petataj pagi la jarkotizon por la jaro 1977 (30 IL) per la ĉi-aldonita poŝtbankĉeko.

Antaŭdankon

NI GRATULAS

Nia ŝatata kaj altestimata s-ano prof. J. Kohen Cedek, konata an niaj legantoj de liaj brilaj tradukoj de la hebrea poezio, ricevis titolon "EMINENTULO ĴERUSALEMA".

La ceremonio de la distingdono okazos la 15-an de Majo ĉ.j. en la Ĵerusalema Teatro. (je la 17-a horo).

ELI kaj JELI kun granda ĝojo eksciis pri tiu ne ĉiutaga evento kaj gratulas nian karen s-anon kaj de-ziras al li longajn jarojn de sukcesoj.



G R A T U L O J

Al la ŝatataj kaj agemaj gesamideanoj

L i o r a kaj M o ŝ e B e n - P o r a t

B i l h a kaj J e h o ŝ u a T i l l e m a n


korajn gratulojn okaze de la naskiĝo de iliaj filoj N i r kaj D o r o n

La estraroj de ELI kaj JELI

D O N A C O J

Haim Juker (pere de d-ro Mašler) : 65 IL

Josef Murĵan donacis al ELI la tutan ŝuldon pro la forvenditaj vortaroj kaj pere de ĝi li fariĝis dumviva membro de ELI.



VOLAS KORESPONDI

Jaromir Hinčica, Šimačkova 27, 709 00 Ostrava -Mar. Hary
Čeĝoslovakio; 20 jara fervojisto. interesiĝas pri diversaj
problemoj, intersanĝas bildkartojn.

S-ano Sebastião Pereira de Silva, Rua José de Farias,
44. Mustardinha, 50 000 RECIFE, PE. Brazil. 24 jara, in-
teresiĝas pri landoj, popoloj, lingvoj, filmoj, p.m.
bildkartoj, moneroj.

Niny Niederhauser, Hafenstr. 48, 8590 Romanshorn, Svisland
kolektas poŝtmarkojn, serĉas amikojn en la tuta mondo.


Joan Rafds Vemdrell, C/Rovica n-o 14, Sant Pau d'Ordal
Barcelona, Hispanio. Egale kiom aĝa.

S-ro IZUMI Yukio, Tuzimati 14-26, Matujama-si, Ehime-ken
790, Japan - kun fraŭlino; interesiĝas pri muziko, poezio
kaj lingvistiko.

K. Lukoševicius, Litovio (U.S.S.R.) Utenos raj, 234900
Saldučiškis, edziĝinta, instruisto en mezlernejo, kolektas
poŝtmarkojn, bildkartojn, interesiĝas pri esp. movado.

Kvar polaj studentoj el Polio volas korespondi kun ĉiuj
egale. Adr.-Stanisław Żylinski, Kolonia 19, 14-520
Pieniężno, Pollando.

La plej granda sveda vesperjurnalo "Vem vill skriva till?"
(adreso: EXPRESSEN, 10516 Stockholm, Svedio.) aperigas ser-
page korespondpetojn se ili estas sendataj el eksterlando.
Uzu la okazon!



E N H A V O

- Datreveno de fama juda verkisto - A. Manor 1.
Fama juda esperantisto: D-ro Asnes - A. Holzhaus 2.
Memoraĵoj - A. Homet 4.
Esperanta stilo - A. Vandel 5.
Ĉu Esperanto estas eŭropa lingvo? - A. Vandel 5.
Peto - S. Even Gabirol - (trad. J. Kohen-Cedek) 6.
Memorkalendaro - Z. Dimant 7.
Japana instruistino en Israelo - 9.
Ejn Gedi - S. Span (trad. J. Kohen-Cedek) 10.
Turisma angulo
Ejn Gedi - H. Mašler 10.
Brildiraĵoj - (kolektis J. Šemer) 13.
Noktomez, pasis jam - (trad. D. Mager) 13.
Unua kiso - J. Giladi 14.
Angulo de JELI
Ridetanta vortaro J. Šemer 15.
Esperanto - edzeranto - Avi kaj Nira 16.
Fri lia movado kaj agado
Zamenhofa vespero - J. Beñar 17.
Nia klubagado - E. Haroun 18.
Helpe de urbestro 19.
Intervjuoj pri Esperanto 20.
Diversaĵoj 21.